

Heinrich Heine,
Tia estas la
mondo

*tradukita de Manfredo
Ratislavo*

Se vi havas multon, vi
Baldaŭ ekposedos plion.
Se malmulton havas vi,
Oni prenos ankaŭ tion.

Lasu entombigi vin,
Se vi havas, aĥ, nenion –
Ĉar vivrajton havas nur
Tiu, kiu havas ion.

*Traduko de la Germana
poemo "Weltlauf" de
HEINRICH HEINE (*1797-
12-13 – †1856-02-17) en
Esperanton de MANFREDO
RATISLAVO (Manfred
Retzlaff, Stettiner Str. 16,
D-59302 Oelde, Germanio,
1938-11-04).

*MR-239-1 / Arg-48-95
(2003-10-25 19:56:49)*

*Verkita de la poeto Hejno,
Henriko (HEINRICH HEI-
NE, 1797 - 1856).*

*Esperantigis: Manfredo Ra-
tislavo en Oktobro de 1990
laŭ la origina germanaling-
va teksto.*

Heinrich Heine,
Tia la mondo

tradukita de Kálmán Kalocsay

Kiu havas multe, baldaŭ
havos eĉ pli grandan riĉon,
kiu havas nur malmulte,
perdos eĉ la nesufiĉon.

Kaj se vi nenion havas,
enterigu vin prefere,
ĉar vivrajton, tramp', nur havas
kiur ion havas tere.

*Traduko de la Germana poemo
"Weltlauf" de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 – †1856-02-17) en
Esperanton de KÁLMÁN KA-
LOCSAY (Kalmano Kaloĉajo,
1911 – †1976).

Arg-48-1077 (2010-05-21 13:08:59)

Heinrich Heine,
Weltlauf

Hat man viel, so wird man bald
Noch viel mehr dazubekommen.
Wer nur wenig hat, dem wird
Auch das wenige genommen.

Wenn du aber gar nichts hast,
Ach, so lasse dich begraben –
Denn ein Recht zum Leben, Lump,
Haben nur, die etwas haben.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo
estas HEINRICH HEINE (*1797-12-
13 – †1856-02-17).*

*MR-239-1 / Arg-48-94 (2003-10-25
00:03:13)*

*Origina germanalingva teksto de
HEINRICH HEINE (1797 – 1856)*